

Iri aŭ veturi - respond-metodo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.08.01 & 03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Laŭ la alfabeto de la familiaj nomoj ni daŭrigas nian perondan salutadon al la skribintoj.

A.- Saluton al Pauleno MELIZ en Monzon, Hispanio, al Bruno NAJBARO en Keighley, Britio pro liaj 13 mesaĝoj. Koncerne niajn recenzojn li skribis:

Cl.- "Por mi tiuj recenzoj estas tre valoraj, ĉar kiel bibliotekisto de federacia biblioteko mi scias, kiujn novajn librojn aĉeti. La fideindecon de iliaj konsiloj kaj rekomendoj mi jam eltrovis."

A.- Saluton al Juan NARVAEZ en Badajoz, Hispanio, kiu sendis 2 mesaĝojn, al Saulcerite NEILANDE en Riga, Latvio, al la Klubo Esperantista en Oslo, Norvegio, kiu skribis:

Cl.- En la kadro de la semajno de internacia amikeco ni sendas samideanajn salutojn kaj deziras bonvenon al la ĉi-somera Universala Kongreso en Bergeno."

A.- Saluton al Leopold PATEK en Klosterneuburg, Aŭstrio, kiu sendis 2 mesaĝojn kaj faras interesan proponon:

Cl.- "En Vieno okazis Konferenco de la Mezeŭropaj Radio- kaj Televid-stacioj: Pollando, Ĉeĥoslovakio, Slovenio, Kroatio kaj Aŭstrio. La aŭstra radio ofertis senpagajn disaŭdigojn kaj instruprogramojn kaj proponis instali borson por proponoj, komunaj disaŭdigoj kaj komunaj projektoj. Similan proponon mi jam konigis al la Esperanto-stacioj, ĉar ili jam nun povas interŝanĝi elsendaĵojn kaj enkonduki la rubrikon: "Radio Eŭropo, Esperanto-programo... Pli granda estus la paŝo: "Radio Tero, Esperanto-programo, vi aŭdos elsendaĵon de Studio Pekino (aŭ alia). Kial la Esperanto-stacioj ne instalas borson por interŝanĝado de Esperanto-programoj? Via stacio havas ofte elsendaĵojn, kiuj estus taŭgaj por interŝanĝo. Ekzemple pri Eroŝenko, Esperanto-instruado...Grava avantaĝo de Esperanto-disaŭdigoj estas ja, ke oni ne bezonas fari elspezojn por tradukado."

A.- Ni atente ekzamenos tiun proponon kun niaj kolegoj kaj kun la direktoro de Svisa Radio Internacia. Saluton al Amaro PIANGE SOARES en Recife, Brazilo, al Hernani A. RESENDE en Lisboa, Portugalio, al Andre RIGAUULT en Plouezec, Francio, kiu registris nian elsendaron pri la formiĝo de la svisa federacio, por ĝin aŭdigi al la klubanoj en St. Brieuc. Al li, kiel al ĉiuj aliaj petintoj, ni sendis fotokopion de nia manuskripto. Li sendis interesan poŝtkarton pri algisto aŭ kamparano veturiganta brunajn algojn ĉerpitajn el la oceano, kiujn li uzas kiel sterkon. Interese estas, ke la klarigoj estas dulingvaj, kaj ke antaŭ la bretona lingvaĵo "Ar bezhiner" estas skribite "bretone", dum antaŭ la teksto "La brun-algisto" estas skribite "en esperanteg". Tiel ĉiu trovas la klarigon en sia lingvo, sed scias en kiu lingvo estas la alia klarigo. Tiun dokumenton ni transsendas al Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Dankon al Ludwig RÖLL en Günzburg, Germanio, kiu sendis 12 aŭdraportojn kun resumoj pri la aŭditaj temoj.

A.- Saluton al Roselio ROMERO en La Habana, Kubo, al J. SAILLOUR en Morlaix, Francio, al Erich SEIDEMANN en Dresden, Germanio, al Hans Georg STRAUSS en Leverkusen, Germanio, al Karlive STUPPNIG en Bydgoszcz, Pollando, kiu salutis okaze de semajno de internacia amikeco, al Paulo S. TERRA en Itabuna, Brazilo, kiu skribis:

Cl.- "La elsendojn de Svisa Radio Internacia mi aŭskultas ĉi tie en Itabuna, ŝtato Bahia, ĉiu-semajne, merkrede kaj sabate. Viaj voĉoj atingas mian urbon ĉiam klare, seninterference. La enhavo de la programoj plaĉas al mi; bedaŭrinde la elsendoj estas nur dekminutaj.

A.- Alexander THALER en Ebnat-Kappel, Svislando sendis 2 mesaĝojn. Li memorigis, ke antaŭ nelonge, kiel profesoro en la kantona lernejo de Zug, li postulis ĉe ni informilojn pri la internacia lingvo, kiun li kredis jam mortinta. Responde ni sendis al li diversajn informilojn kaj eltiraĵojn surbendigitajn el nia programo kaj programoj de aliaj sendstacioj, kiujn li montris kaj aŭdigis al siaj gelernantoj. Kaj li lernis esperanton kaj konkludas:

Cl.- "Se iafoje Esperanto gajnus la lernejojn, ĝi estus gajninta la mondon;"

A.- Pri niaj elsendoj, kiujn li aŭskultas, li skribis:

Cl.- "Viaj prelegoj pri la historiaj eventoj, kiuj kondukis al la Svisa Konstitucio de 1848, estas tre informriĉaj ne nur por eksterlandanoj, sed eĉ por svisaj instruistoj, kiuj jam instruis svisan historion dum kvardek jaroj."

A.- Kaj li petis fotokopion de niaj tekstoj. Saluton al Jindrich TOMISEK en Rikovice, Ĉeĥoslovakio, kiu sendis 2 mesaĝojn kaj skribis:

Cl.- "Mi tre aprecas viajn esperanto-elsendojn, precipe tiujn en kiuj vi prezentas vian landon, ĉar vi prezentas Svislandon tre interese kaj kiel eble plej objekte, ne trudante ĝin kiel modelon por aliaj, sed kiel portanto kaj peranto de ideoj kaj spertoj, kiuj povas esti utiligeblaj ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple ni povus multe lerni de vi irante denove la vojon de la demokratiigo."

A.- Petante kopion de la elsendoj pri la formiĝo de la svisa federigo li aldonis:

Cl.- "Mi petas la tekston por ne nur denove tralegi kaj studi ĝin, sed ankaŭ pere de ĝi prelegi en nia Esperanto-Klubo en urbo Prerov al niaj klubanoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povas aŭskulti viajn interesajn Esperanto-elsendojn. Pri la rezulto mi poste informos vin."

A.- Saluton al Georgij TUJAKIN en Moskvo, Sovetio, al Jean-Pierre VANDENDAELE en Eupen, Belgio kaj al Mila VAN DER HORST-KOLINSKA en Den Haag, Nederlando, kiu sendis 8 mesaĝojn aŭdraportajn. Ŝi faras lingvan demandon:

Cl.- "Hodiaŭ kun kontento mi aŭskultis la novelon el la kolekto de novelaro VAGO TRA LA DIMENSIO. En tiu teksto vi uzis, mi citas: "la aŭto ekiris" kaj iom poste "ili ekveturis". Ĉu vi povus foje klarigi al la aŭskultantoj la diferencon inter aŭto iras kaj aŭto veturas. Multfoje en mia praktiko mi renkontis personojn, kiuj absolute ne akceptis la formon aŭto iras, ĝi devas veturi."

A.- Nia respondo estos tute simpla. Ni malfermas Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto je la rubribo ir/i kaj ni trovas diversajn difinojn kaj korespondajn ekzemplojn.

Cl.- Moviĝi per la tiucelaj membroj, piedoj, flugiloj, naĝiloj.

A.- Moviĝi direkte al iu aŭ io.

Cl.- Moviĝi malproksimen de iu aŭ io.

A.- Moviĝi helpe de besto, de maŝino ktp.

Cl.- Kaj ni legas ekzemplon kun la vorto aŭto:

A.- Iri al la kongreso per aŭto, fervojo, aviadilo; iri sur la maro.

Cl.- Sekvas resendo al la verboj veturi, rajdi, flugi. Ni do forlasu la rubrikon iri, kie ni povus ankoraŭ legi kvar aliajn difinojn kaj multajn ekzemplojn, por trovi la rubrikon veturi. Kaj ni trovas la difinon:

A.- Esti transportata de unu loko al alia per tiucela aparato aŭ maŝino.

Cl.- Sekvas vico da ekzemploj. Ni legu kelkajn:

A.- Riĉulo veturas, malriĉulo kuras: veturi per kaleŝo, en vagonaro, sur ŝipo; eksterordinara ŝipo, per kiu li povis veturi en la aero; ni veturas per glitveturilo; veturi el Varsovio rekte Parizon.

Cl.- Ĉiuj tiuj ekzemploj estas zamenhofaj. Kaj nun, kion konkludi! Ke nia PIV estas bona respondilo. Koncerne la verbojn iri kaj veturi, ĝi komprenigas, ke iri estas vastsignifa verbo, dum veturi signifas iri per maŝino. Se cirklo indikus la signifaron de iri, la cirklo, kiu indikas la signifaron de veturi troviĝus en la cirklo iri. Same estus por rajdi kaj flugi, kiuj priskribas diversajn manierojn iri.

A.- La personoj renkontitaj de Mila VAN DER HORST-KOLINSKA, kiuj absolute ne akceptas la formon aŭto iras, ĉar por ili ĝi devas veturi, fuŝparolas Esperanton, ĉar ili ne konsultas referencajn librojn, kiuj estas nuntempe ĉefe PIV, sed ankaŭ PAG, Lingvaj Respondoj kaj La Fundamento. Sur la skribo-tablo de ĉiuj seriozaj instruisto, redaktoro kaj esperantisto nepre troviĝu tiuj referenciloj.

A.- Nome de Svisa Radio Internacia salutas Claude kaj Andree GACOND: Ĝis la reaŭdo!